# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.–SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».–Januaro 1913.–Nro 1 (7)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

EÑHAVO : *Feliĉan Novjaron.* — *Projekto de unugrupiĝo. Dankon. Konkurso por la lernantoj,* Jozefo Grau. — *Adresaro de «Barcelona Stelo».*

FELIĈAN NOVJARON «BARCELONA STELO» SINCERE DEZIRAS AL ĈIUJ AMIKOJ DE ESPERANTO : : La Komitato

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

Ni invitas ĉiujn barcelonajn grupojn kaj societojn sendi delegitojn aŭ reprezentantojn al la kunsido, kiu okazos en nia sidejo str. Marqués del Duero, 88, la 23an de Januaro je la 9.a vespere.

En tiu kunsido estos prezentata antaŭ la kunvenintoj la tuta projekto de unuiĝo de la barcelonaj grupoj, kiun oni povos pridiskuti kaj esplori. Ni ne dubas, ke la ĉefaj bazoj kaj reguloj plaĉos al ĉiuj. Tamen la verkintoj ne pensas, ke ili faris ion perfektan : niaj amikoj povos ĝin pliperfektigi.

Per la venonta numero ni raportos pri la rezultato de la kunsido. Ni esperas, ke ĝi estos kontentiga.

## DANKON

Ni ricevas jam de du-tri monatoj kelkajn numerojn de esperantistaj gazetoj interŝanĝe de nia modesta BULTENO. Ili estas : *La Ondo de Esperanto, Kuracisto, Panonio, Brazila Esperantisto,* k. t. p.

Aperiĝante nian Bultenon ni ne intencis starigi ian interŝanĝon, ĉar ni bone konscias nian malgravecon. Ni eldonis ĝin por montri antaŭ niaj samideanoj la internan vivon de nia societo kaj ĉefe por instigi la barcelonajn esperantistojn partopreni en komuna agado, vivi en rondo familia. Tio espereble sukcesos al ni.

Dume, ni plej kore dankas la redakciojn de la gazetoj interŝanĝantaj kun ni por la helpo, kiun ili donas al nia grupo, sendante ĉiujn siajn numerojn. Ili kontribuas tiamaniere al la sukceso de nia agado.

## KONKURSO POR LA LERNANTOJ DE NIAJ KURSOJ

La Komitato de «Barcelona Stelo» decidis en sia novembra kunsido donaci 30 pesetojn inter la lernantoj, kiuj ĉeestas la kursojn de Esperanto en nia grupo. Tiu sumo estos partigita en tri premiojn: unu da 15 pesetoj; dua da 10 pesetoj kaj alia da 5 pesetoj.

Tiujn premiojn oni aljuĝos al la lernantoj, kiuj pruvos havi pli grandajn konojn pri Esperanto en la konkursaj ekzamenoj, kiuj okazos dum la venonta Marto. Ceterajn detalojn pri tio ĉiu povas peti en nia sidejo.

JOZEFO GRAU

## ADRESARO DE «BARCELONA STELO», LA 1.an DE JULIO 1912

*(Daŭrigo)*

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 56 | Fino. | M. Grau | strato | Claris, 72. |
| 57 | » | R. Simó | » | Rosal, 87, 1r - 2a |
| 58 | Sro. | J. Coll | » | Consell de Cent, 96, 2n - 2a |
| 59 | » | M. Torrabadella | » | Riereta, 15, 1r - 1a |
| 60 | » | M. Perzón | » | Mata, 32, 2n - 2a |
| 61 | » | R. Teixidó | » | Mar, 35, (Badalona). |
| 62 | Fino. | A. Garcia | » | Cruz Canteros, 15, pral., 2a |
| 63 | » | L. Garcia | » | Cruz Canteros, 15, pral., 2a |
| 64 | » | C. Martí | » | Salvà, 18, tda. |
| 65 | Sro. | P. Garcia | » | Victor Balaguer, 9, tda. |

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.–SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».-Februaro 1913.–Nro 2 (8)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU


BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Projekto de unugrupiĝo*, Raportisto. — *Vizito. Sciigoj. Ĉagreniga novaĵo*, Jozefo Grau.

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

La 23an de Januaro honorigis nian sidejon per sia ĉeesto reprezentantoj de 12 grupoj barcelonaj, kiuj kunsidis laŭ la invito, kiun ni aperigis la pasintan monaton. Antaŭ ili kaj dudeko da personoj, kiujn interesis la anoncita kunsido, la komisiono prizorganta la projekton de regularo por la unuiĝo prezentis ĝin.

Komence Sro. Rey, prezidanto de «B. S.» cedis la prezidan lokon al Sro. Campdelacreu, prezidanto de *La Rondo*, kiun la ĉeestantoj afable akceptis kiel sian prezidanton. Li tuj transdonis parolon al Sro. Grau, kiu longe raportis pri la projekto verkita de la membroj de *La Rondo, Ĉiam Antaŭen* kaj *Barcelona Stelo*. Li diris, ke la verkintoj ekzamenis la kaŭzojn malsukcesigintajn la provojn unuiĝi antaŭe faritajn kaj konsciinte ilin, provis ilin solvi por ne riski denove danĝeran pereon. Mi ne donos multajn detalojn el la prezentataj de Sro. Grau, ĉar oni povas ilin ŝanĝi, kaj estus senutile raporti pri ili. Mi nur diros, ke la projekto faris bonan impreson; ke oni ĝin presos kaj dissendos al ĉiuj barcelonaj grupoj kaj ke tiuj ĉi proponos ĉiujn modifojn, kiuj povas perfektigi la verkon.

Poste, laŭ propono de Sro. Pujulà, kiu reprezentis nian grupon, estis akceptata unuanime de la sinjoroj, kiujn mi citos poste, la sekvanta konkludo:

*«La kunsidanta delegitaro vidas kun simpatio kaj entuziasmo la ideon de alproksimiĝo aŭ kunfandiĝo de la grupoj en Barcelono».*

Alprenis tiun decidon Sroj. Bori, en reprezento de *Esperanta Aŭroro* (K. E. F.); Carmona, de *Paco kaj Amo;* Diaz, de *Esp. Racionala Grupo,* (K. E. F.); Anglés, en la nomo de *Ĉiam Antaŭen* (K. E. F.); Hil, en tiu de *La Rondo* (K. E. F.); Piñol, reprezentanto de *Supren!* (K. E. F.); Cruz, de *Esperanta Movado;* Agut delegito de *Esperanta Frateco* (K. E. F.); Llorach, de *Espero Kataluna;* Horta, en la nomo

de *Semo*, (K. E. F.); Pujulà reprezentanto de *Barcelona Stelo* (K. E. F.) kaj Blanch de *Esperanto kaj Patrujo* (K. E. F.). Kelkaj el tiuj sinjoroj sciigis, ke la signifo de iliaj voĉoj povos esti ŝanĝata de la decidoj de la grupoj respektivaj, kiuj rajtigis ilin kiel aŭskultantojn de la projekto; tamen ili diris, ke tio ne estas esperebla.

Aprobinte ke la sama komisiono daŭrigu laboradon pri la projekto prezentita, per kantado de «*La Espero*» oni finis la kunsidon.

RAPORTISTO

## VIZITO

Nia holanda samideano Sro. H. P. Allaries, oficiro maŝinisto en la ŝipo «Jacob van Harkesk» restinta kelkajn tagojn en nia haveno, havis la afablecon viziti nin la 21$^{a}$ de Januaro. Mi kore dankas lin por la honoro, kiun li faris al ni per sia vizito, kaj prezentas al li la sincerajn bondezirojn de niaj kungrupanoj.

## SCIIGOJ

La Komitato de «B. S.» organizas vizitojn al la Fabrikoj de gazo kaj elektro kaj al la eksperimenta scienca kabineto «Mentora» en la Tibidabo. Ano de nia grupo faros en tiuj lokoj klarigajn paroladojn esperante.

— Ni sciigas al niaj kungrupanoj neofte vizitantaj la grupejon, ke la monkolekto por la standardo de K. E. F. estos fermata baldaŭ Poste oni ne plendu!

## ĈAGRENIGA NOVAĴO

Nia samsocietano Sro. Amadeo Nebot ĵus mortis. En tiu malfeliĉo ni petas lian fraton kaj kungrupanon nian, Sron. Isidro, kaj ilian familion akceptu la sinceran kondolencon de BARCELONA STELO.

JOZEFO GRAU

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.–SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».–Marto 1913.–Nro 3 (9)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Malgraŭ. — *Projekto de unugrupiĝo*, Jozefo Grau.

## GRUPAJ AFEROJ

*La nova Komitato.* Laŭ nia regularo ses membroj de la Komitato devis je la komenco de la jaro ĉesi en siaj oficoj. La ĝenerala kunveno de la Grupo, kiu okazis la 28an de Januaro, elektis iliajn anstataŭantojn. La oficoj en la nuna Komitato estas konfiditaj al la sekvantaj gesinjoroj:

*Prezidanto,* Sro. Stefano Rey; *Vicprezidanto,* Sro. Jozefo Grau; *Sekretario,* Sro. Johano Puig; *Vicsekretario,* Sro. Ramono Pérez; *Kasisto,* Sro. Mariano Pascuet; *Kalkulistino,* Fino. Rozo Cortés; *Bibliotekisto,* Sro. Petro Navas; *Gemembroj,* Finoj. Laura Sánchez, Koncepcio Puig; Sroj. Jozefo Carcereny, Bernabe Mira, Estanislau Pellicer, Antono Viñals.

*Konkurso por niaj lernantoj.* — La 18an de Marto havos lokon la ekzameno de niaj lernantoj partoprenantaj en la anoncita konkurso. La Juĝantaron konsistiĝos Sroj. Rey, Pujulà, Pellicer, Gili kaj Grau. La ekzamenatoj devos fari la sekvantajn ekzercojn : Legi la duonon de unu paĝo el la Krestomatio. Traduki skribe, sen helpo de ia libro dum 30 minutoj, 5 frazojn katalunajn. Respondi al kelkaj demandoj pri gramatiko.

Kiel ni diris, al tiuj, kiuj elmontros plej grandajn konojn pri Esperanto, estos aljuĝitaj tri premioj valoraj je 15, 10 kaj 5 pesetoj. Ĉiuj lernantoj, kiuj ĉeestas la kursojn en nia societo, rajtas partopreni en la Konkurso.

*Adiaŭo.* — Niaj fervoraj samgrupanoj Sroj. Delclós kaj Guixà la 1.an de Marto forlasis nin, komencinte sian militservon. Por montri al ili la ĉies simpation la 16an de Februaro kvardeko de niaj geanoj regalis ilin per amuza ekskurso al la Fonto de Sant Ciprià, bele lokita en valo ĉe la ĉirkaŭurbaj montoj. Gajeco regis dum la tuta irado kaj kortuŝaj tostoj vidigis al la regalatoj forveturontaj la bedaŭron kaj amikecon de iliaj kunsocietanoj. Baldaŭan revenon inter nin, karaj amikoj!

*Kurso.* — Nia distinginda kungrupano Sro. E. Pellicer, diplomita profesoro de la K. E. F., prenis sur sin la taskon konduki la praktikan

kurson, kiun ĝis nun gvidis Sro. Grau. La kurso okazas ĉiujn mardojn, ĵaŭdojn kaj sabatojn de 9.ª ĝis 10ª vespere, en nia sidejo.

*Festoj*. — Krom la vizitoj, pri kiuj ni raportis en la pasinta n.º de la BULTENO, estas en preparo granda vesperfesto, kiu havos lokon ĉe la mezo de Aprilo. Ni esperas, ke ĝi estos brila festo. Detalojn ni donos per la venonta numero.

*Gazetoj ricevitaj intersanĝe*. — «La Ondo de Esperanto», «Kuracisto», «Panonio», «Brazila Esperantisto», «Časopis Českych Esperantistŭ», «Hungarlanda Informilo», «Normanda Stelo», «Belga Esperantisto». Al ili ĉiuj plej sinceran dankon.

*Kion patrino povas suferi*, originale verkita de Hendrik Conscience en flandra lingvo. Esperanta traduko de Frans Schoofs. Prezo: 20 sp. — Fr. 0'50.

Ni donace ricevis tiun interesan libron verkitan en bona Esperanto; koran dankon! Karaj samsocietanoj, aĉetu ĝin!

MALGRAŬ

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

La venontan monaton en nia *Bulteno* ni komencos publikigi la projekton de regularo por unuiĝo de la grupoj barcelonaj, prezentita antaŭ la delegitoj en la kunsido, kiu okazis la 23ªⁿ de Januaro. La komisiono, kiu ĝin prilaboris, presigos nur la regulojn rilatantajn al la unua periodo de unugrupiĝo.

Tiuj, kiuj rilatas la duan kaj trian periodojn, estos prezentataj, kiam la por la unua periodo reguloj estos tute fiksitaj, kaj la grupoj estos ilin akceptintaj. Tiam, se la rimarkoj, kiujn oni faris kaj akceptis por la regularo de la prova periodo, ĝin esence aliformigis, ilian spiriton oni povos enigi en la regulojn por la sekvantaj periodoj, pri kiuj jam ne zorgos la nuna komisiono, sed la organiza komitato, kiun la grupoj elektos.

Ni supozas, ke al ĉiuj barcelonaj samideanoj plaĉas la demokratema agado de la membroj de la komisiono, kiuj penas trovi la mezan punkton, ĉe kiun la diversaj opinioj renkontiĝas. Tamen ili petegas ĉiujn, kiuj ne aprobas ilian agadmanieron, bonvolu esprimi sian sinceran opinion, kaj se necese ili tial sanĝos aŭ modifos sian procedon. Oni ne forgesu, ke la devizo de la okazaj organizantoj (la projekto kaj ĝia rezultaĵo estas nenies propraĵo) estas : Memorigi ĉiun pri ĉio kuniganta; klopodi eviti ĉion, kio povas kaŭzi disigon.

Ĉu oni ne oferos siaflankajn vidipunktojn kaj opiniojn, — kiuj ofte estas nur esprimo aliforma de la opinioj de la ceteraj samideanoj, — por profiti je la bonoj de granda organizaĵo komune starigita? La diroj de multaj barcelonaj esperantistoj antaŭcertigas pri la sukceso de la komencita entrepreno, kaj ni esperas, ke oni ne rifuzos fari pro konkordo la malgrandajn oferojn, kiuj montriĝos necesaj.

La progreso de Esperanto ĉe ni estos la rekompenco.

JOZEFO GRAU

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.-SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».-Marto 1913.-N^ro 4 (10)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

---

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

---

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Malgraŭ. — *Projekto de unugrupiĝo*, Jozefo Grau.

---

## GRUPAJ AFEROJ

*Malavara donaco.*—La Biblioteko de nia grupo pliriĉiĝis per la tuta kolekto de «La Revuo» bele bindita, kiun la eminenta ŝakproblemisto kaj fervora samideano Sro. Jozefo Paluzie, donacis al la BARCELONA STELO. La Direkta Komitato danke de tiu altvalora donaco decidis en sia ordinara kunsido, la 27^an de Marto, peti de Sinjoro Paluzie ke li akceptu fariĝi Honora membro de nia societo. Ni esprimas al li publike la plej koran dankon.

*Konkurso por niaj lernantoj.*—Laŭ la anoncita programo, okazis la 18^an de Marto en nia sidejo la ekzamenoj de la Konkurso por la lernantoj de niaj kursoj. 20 el ili partoprenis en la ekzercoj. La rezultaĵoj de la skriba provo estis tre kontentigaj kaj la parola provo farita antaŭ multaj aŭskultantoj pruvis ke la ekzamenatoj bone konas nian lingvon. La Juĝantaro,kiu konsistis el Sroj. Rey, Pujulà, Pellicer, Gili kaj Grau unuanime aljuĝis la premiojn laŭ la jena ordo.

*Unua premio*, 15 pesetoj, al Sro: Antono Viñals. *Tri duaj premioj*, 5 pesetoj ĉiu, al gesinjoroj Rosa Cortés, Palmiro Guilleumot kaj Rafael Sorolla laŭ la ordo montrita. *Tri triaj premioj*, konsistantaj el unu ekzemplero de la Gramatiko kaj Vortaro de Sro. F. Pujulà, afable de li donacitaj, al gesinjoroj, Johano Puig, Mercé Rey kaj Bernabé Mira, kaj *Mencioj* al Sroj. Petro Navas kaj A. Graells.

Sro. Rey en la nomo de la komitato gratulis la profesorojn de la grupo, kiuj semis la ĝermojn tiel bele fruktodonintajn kaj Sinjoro Grau kuraĝigis la nelaŭreatojn laboradi konstante por atingi la premiojn en venontaj konkursoj.

La premioj estos disdonitaj dum la solena vesperfesto, kiu estas organizata.

*Serio de paroladoj.* —La 3$^{an}$ de Aprilo Sro Pujulà komencis la serion de paroladoj por la lernantoj de nia supera kurso, parolante pri Parizo, pri kiu li rakontis per klaraj frazoj al la atentaj aŭskultantoj, kiuj malgrŭ la pluvego ĉeestis en nia sidejo.

Tiuj paroladoj okazos la unuan mardon de ĉiu monato kaj al ili estas de nun invititaj ĉiuj esperantistoj. La 6$^{an}$ de Majo parolados Sro. Grau pri la teorio de senfadena telegrafo, kaj en Junio Sinjoro Dalmau esprimos sian opinion pri la metodoj instrui Esperanton. La serion daŭrigos aliaj eminentaj pioniroj, kaj ni esperas, ke iliaj klopodoj prosperos altiri al tiuj kunvenetoj ne nur niajn grupanojn sed ankaŭ la ceterajn barcelonajn esperantistojn.

*Gazetoj ricevitaj interŝanĝe.* —Krom la en nia lasta nº 13 cititaj ni ricevis Grafologia Revuo'n kaj La Bulteno'n.

Ankaŭ estis ricevitaj diversaj cirkuleroj kaj la interesa verko aperinta en «Franca Esperantisto» *Studo pri la organizo de Esperanto.*

MALGRAŬ

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

Ni ne povas pleumuni nian promeson ekpublici per tiu ĉi numero la projekton de regularo por la unugrupiĝo de la barcelonaj grupoj. Ni fidas je la indulgo de niaj samideanoj: La proksima numero enhavos la promesitan projekton kaj la proponojn de la komisiono pri ĝia esploro kaj akcepto.

JOZEFO GRAU

★ ★ ★

700 014

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II. - SUP. DE «KATALUNA ESPERANTISTO». - JUNIO-JULIO 1913. - N^ro^ 5 (11)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Disdono de premioj. Vizitoj. Sukceso. Novaĵoj*, Malgraŭ.— *Projekto de unugrupiĝo*, La Komisiono.

## DISDONO DE PREMIOJ

Oni riskas la danĝeron malhumile paroli, raportante pri Festo okazinta en nia grupo. Tial ni koncize raportos, ĉar ni ne dubas, ke la ĉeestantoj en nia vesperfesto la 21^an^ de Majo aldonos kvazaŭ komentarie la mallaŭdojn aŭ laŭdojn al la priskribotaj faktoj.

Busto de Dro. Zamenhof ĉirkaŭata de laŭroj kaj palmoj sub la standardo de «B. S.», prezidis la feston. Girlandoj de verdaj folioj, flagoj, steloj, k. t. p. kovris la murojn. Je la 10^a^, kiam en la salono floris la belaj barcelonaj samideaninoj, Sro. Graells komencis la serion de deklamoj per legado de «Versaĵo pri Amo» de Sro. Bicknell. Fraŭlineto Pascual legis mirinde «Kanteton» kaj ricevis multajn aplaŭdojn. Fraŭlinoj Leonor, Rey, Navas kaj Cortés deklamis versaĵojn en esperanto kaj kataluna lingvo, kaj Sroj. Sorolla kaj Iduarte legis versaĵojn kastile kaj katalune.

Inter kaj post la versaĵoj estis ludataj muzikaj kompozicioj, kaj post la elektraj eksperimentoj, kiujn Sro. Grau faris antaŭ la ĉeestantaro, okazis la disdono de premioj al la laŭreatoj en nia Konkurso.

Sro. Pujulá, en bela parolado, rakontis pri la imitinda konstanteco de la premiitoj, kiuj oferis al la lernado la horojn de ripozo; gratulis varme ilin kaj esprimis sian deziron, ke la nova kurso estu tiel fruktodona, kiel la ĵus finita. Sro. Pellicer legis la nomojn de la premiitoj, publikigitajn en nia lasta Bulteno, kiuj iris ricevi de Sro. Rey la premiojn. Sro. Viñals, unua laŭreato, en la nomo de ĉiuj lernantoj eldiris sinceran paroladon, dankante la profesorojn kaj dediĉante kortuŝantajn frazojn al la kunsocietanoj mortintaj kaj al tiuj restantaj malproksime de ni.

Fine, Sro. Grau dankis la kunlaboradon de la profesoroj de la Grupo kaj la kunhelpon de la lernantoj, kiuj penis senĉese sukcesigi la kurson donitan. Anoncis la kurson baldaŭ komencotan kaj stimulis la neesperantistojn ĝin viziti kaj ĉeesti.

La balo komenciĝis tuj, post kiam Sro. Rey fermis la disdonadon kaj la salono prenis aspekton ĝojan, kiu kontrastis kun la okazintaj ceremonioj. Senlaca gedancantaro restis ĉe nia sidejo ĝis la 3^a^ matene, kaj la deziro je alia simila festo estis de ĉiuj esprimata ĉe la disiro kaj adiaŭoj.

Ni ne citas nomojn, ĉar ni povus forgesi estimindajn amikojn;

ni tamen ĝojas, ke *ĉiuj* grupoj barcelonaj estis reprezentataj en la Festo. Ĝia organiza komitato ĉiujn sincere dankas.

## VIZITOJ

Kapitano Perogordo, reveninte de Olot, honoris nian grupon per la vizito, kiun li faris la 13an de Majo. Ni dankas lian afablecon kaj bedaŭras, ke ni ne povis inde regali lin. Ni esperu, ke ni havos okazon kvitiĝi de tiu devo.

Ankaŭ vizitis nian sidejon, la 19an de Junio, Sro. Jozefo Ventura González, redaktoro de «La Suno Hispana», al kiu ni sendas de tie ĉi la dankajn esprimojn de niaj grupanoj por liaj afablaj frazoj pri ni.

## SUKCESO

Antaŭ du jaroj, Sro. Grau komencis kurson de Esperanto por tramveturilistoj, kiun ĉeestis entuziasme dudeko da ili. Post kelkaj monatoj la nombro da fervoruloj malkreskis iomete: la deĵoro dum la kursaj horoj malproksimigis de ni karajn amikojn. Tamen, kelkaj el ili ĉeestas ankoraŭ niajn lecionojn, sed ĉar ilia ĉeesto ne povas esti ofta, la rezultato de ilia klopodado estas nur relative kontentiga.

Per sia konstanta fervoro distingiĝis ĉiam Sroj. Antono Viñals kaj Bernabé Mira, laŭreatoj en nia konkurso. La Direktoro de la Barcelona Tramkompanio, Sro. Mariano de Foronda, afable helpis ĉiuokaze la esperantistojn kaj kiam la cititaj tramistoj prezentis al li la atestojn pri siaj ekzameno kaj premio, Sro. Foronda permesis al ili uzadon sur la uniformo de granda verda stelo sur blanka fundo, kaj egaligante ilin al la laboristoj parolantaj iun fremdan lingvon, plialtigis ilian salajron je 2 spesmiloj ĉiumonate.

Sro. Viñals kaj Mira estas la unuaj personoj en nia urbo, kiuj sur ia uniformo *devas* portadi esperantistan insignon, kiun la publiko facile kaj profite rimarkos.

Ni petas la esperantistaron, kunigi al nia danko por Sro. Foronda kaj al nia gratulo por Sroj. Mira kaj Viñals, siajn dankon kaj gratulon al la kompaniestro esperantema kaj al la tramveturilistoj esperantistoj.

## NOVAĴOJ

Malfermo de nova elementa kurso okazis ĉe nia sidejo la 15an de Julio. Ĝi okazos marde kaj sabato de 9a ĝis 10a vespere. Praktika kurso okazos la ĵaŭdojn je samaj horoj.

— Ekskurso al la Fizika kabineto «Mentora», estas preparata por kompletigi kaj vastigi la eksperimentojn prezentitajn de Sro. Grau dum nia Maja vesperfesto, kiujn li ripetis kun teoria klarigo al la «B. S.» anoj la 3an de Junio dum la ĉiumonata esperanta parolado.

— La 1an de Julio Sro. Delfí Dalmau elokvente paroladis ĉe nia sidejo pri temo multe interesa: Didaktiko en la instruo de Esperanto. La 5an de Agusto Sro. Campdelacreu faros alian paroladon, al kiu estas invititaj la Esperantistoj.

MALGRAŬ

# PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO POR LA BARCELONAJ ESPERANTISTAJ GRUPOJ.

## ĜENERALAJ REGULOJ

1ª Por helpi al pli granda disvastiĝo de la lingvo internacia Esperanto de Dro. L. L. Zamenhof, fondiĝas en Barcelono societo kun la nomo : *Barcelona Esperantista Societo* (B. E. S.)

2ª B. E. S. organiziĝos per unuiĝo de la grupoj, kiuj tion deziros, dum tri periodoj nomataj respektive : *prova*, *organiza* kaj *definitiva*.

3ª La sola lingvo oficiala ĉe B. E. S. estos Esperanto; oni uzos la katalunan aŭ kastilan, kiam B. E. S. devos sin turni al enlandaj societoj neesperantistaj, kies nomoj estas katalune aŭ kastile redaktitaj.

4ª Tuj de post sia aliĝo al B. E. S. la grupoj aliĝintaj ne povos ion ŝanĝi aŭ konkludi sen la kontrolo de ĝia Komitato. Ili devos agadi laŭ la reguloj interkonsentitaj.

## REGULOJ POR LA PROVA PERIODO

1ª Estas nomata *prova periodo* la tempo, el kiu konsistas la ses unuaj monatoj, kalkulitaj de post la tago, kiam la grupoj reciproke aliĝis por starigi B. E. S.'on.

2ª Ĉiu grupo aliĝinta konservos dum la prova periodo sian nomon kaj alprenos la subnomon «Filio de B. E. S.»

3ª La grupoj povos tute sendepende de B. E. S. elekti sian Komitaton.

4ª Ĉiuj ceteraj cirkonstancoj de socia vivo, propraĵoj, standardo, stampo, k. c. restos tute senŝanĝe dum la prova periodo.

5ª Zorgos pri B. E. S. kaj ĝia plena efektiviĝo unu Komitato konsistanta el unu delegito de ĉiu grupo aliĝinta.

6ª La membroj de la Komitato kunsidos unufojon ĉiumonate en tago, kiun oni antaŭfiksos en ĉiu kunsido, sub la prezido de la plej aĝa el ili, por plenumi la komision konfiditan al ili de la 5ª regulo.

7ª Ĉar la oficoj en la Komitato estos difinitaj al neniu persono, post horduono post la horo fiksita de la kunvoko, povos okazi kunsido se la nombro de kunsidantoj estos du trionoj de la tuta nombro da komitatanoj.

8ª La Komitato povos eksterordinare kunsidi, kiam en la ordinaraj kunsidoj ĝiaj membroj estos difinintaj la daton de la eksterordinara kunveno.

9ª En ĉiu kunsido de la Komitato la konkludoj estos alprenitaj per plimulto de voĉoj. La nombron de voĉoj oni kalkulos laŭ la regulo sekvanta.

10ª Ĉiu delegito komitatano en B. E. S. havas tiom da voĉoj, kiom da membroj havas la grupo, kiun li reprezentas.

11ª La delegitoj ne povos duonigi la nombron da voĉoj, kiujn ili reprezente havas, por voĉdoni per ili samtempe *por* kaj *kontraŭ* la diskutita afero.

12ª Anoj de B. E. S. estos nur la grupoj aliĝintaj, kiel izolaj tutaĵoj. El tiu regulo oni faros la escepton pri kiu parolas la sekvanta.

13ª Estos akceptataj kiel *protektaj anoj*, senvoĉaj en la voĉdonoj, tiuj personoj aŭ societoj, kiuj pagos kotizaĵon de si donace fiksitan.

14ª Ĉiu aliĝinta grupo pagos ĉiumonate al la B. E. S. unu spesdekon (0,025 peseton) por ĉiu ano, kiun ĝi havas.

15ª La kotizaĵojn, pri kiuj parolas la 13 kaj 14 reguloj, gardos la delegito, kiun liaj kunkomitatanoj elektis por la ofico de kasisto.

16ª Tiujn kotizaĵojn oni elspezos por propagando, poŝto, k. c.

17ª Se ia kaŭzo disfaligus B. E. S.'on la mono restanta en kaso estos disdonita inter la grupoj, kiuj konsistigis B. E. S.'on, proporcie al la sumo, kiun ili estas donintaj al ĝi.

18ª La Komitato agos en la apliko de tiuj ĉi reguloj laŭ regularo interna, interkonsente redaktita dum ĝia unua kunsido.

19ª Veninte al la fino de la prova periodo la Komitato verkos raporton kompletan pri la financa situacio kaj vivostato de la B. E. S.

20ª La grupoj devos akurate pagi al la B. E. S. la fiksitajn kotizaĵojn. La grupo, kiu pro neplenumo de ĉi tiu regulo estos eksigita de la B. E. S. ne povos postuli la redonon de la kotizaĵoj pagitaj.

21ª Ankaŭ la grupo propravole eksiĝinta de la B. E. S. ne povos postuli tiun redonon priparolitan de la antaŭa regulo.

22ª Ĉe la komenco de la 5ª monato tiuperioda la Komitato kunvokos ĝeneralan kunsidon de la membroj de la grupoj aliĝintaj, kiu havos lokon dum la lasta duono de tiu monato en la grupa sidejo interkonsente elektita.

23ª Tiu ĝenerala kunveno ekzamenos por aprobo la raporton de la Komitato, ordonitan de la 19ª regulo. Ĝi decidos pri la eniro de B. E. S. en sian organizan periodon kaj elektos ĝian novan Komitaton.

24ª En la okazo, se la ĝenerala kunsidantaro decidas la malaperon de B. E. S. ĉiu el la grupoj, kiuj ĝin konsistigas, okazigos kunsidon de ĉiuj siaj anoj, kiuj voĉdonos pri la daŭrigo de B. E. S.

25ª Tiuokaze ĉiu Komitato liverus al la B. E. S.'a Komitato rajtigitan ateston pri la nombro de voĉoj por aŭ kontraŭ la daŭrigo de B. E. S.

26ª La voĉoj por kaj kontraŭ de unu grupo estus adiciataj al tiuj de la ceteraj, kaj laŭ la opinio montrata de la plejmulto da voĉoj la Komitato de B. E. S. daŭrigus aŭ malaperigus ĝin.

27ª Plenumante la 10ªⁿ regulon, ĉiu grupo prezentos noton ekzaktan pri la nombro de siaj geanoj, en kiun oni aldonos ĉiujn rimarkojn pri aliĝoj kaj eksiĝoj.

28ª Grupoj povos esti akceptataj en B. E. S'on eĉ kiam la unua periodo estos komencita : ili devos pagi dum la tempo ĝis la fino de la prova periodo egalan sumon kiel la aliaj grupoj.

29ª Ĉiu afero neantaŭvidita de tiuj ĉi reguloj solviĝos laŭ la opinio de la Komitato.

30ª Tiuj ĉi reguloj estos senvaloraj kiam, enirinte en la organizan periodon, la Komitato reelektita estos redaktinta ĝian regularon.

La Komisiono


# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.-SUP. DE «KATALUNA ESPERANTISTO».-AŬGUSTO 1913.-Nro 6 (12)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Jozefo Grau. — *Projekto de unugrupiĝo*, Malgraŭ.



Sinjoroj Antonio Viñals kaj Bernabé Mira, grupanoj de «B. S.», en uniformo de tramistoj, kun la esperantista i signo

## GRUPAJ AFEROJ

La komencon de la nova kurso ni reklamis per grandaj afiŝoj en la VIIa kvartalo de Barcelono. Ili bone efikis, ĉar multaj novaj lernantoj vizitas nian kurson, kiun gvidas S-ro. E. Pellicer, diplomita profesoro, helpate de F-ino. Cortés (mardojn kaj sabatojn 9a-10a vespere).

La Komitato decidis okazigi en la fino de la kursoj konkurson similan al tiu de la pasinta Marto, sed kun pli valoraj premioj, pri kiuj ni sciigos pli malfrue.

— Ni ricevis de la grupo de Valencio (koran dankon) tre luksajn afiŝojn

en Esperanto anoncantajn la jaran festaron en la bela urbo de l' floroj. Jen imitinda propagando.

— S-ro. J. Puig eksiĝis el la ofico de sekretario de nia Komitato. Lin anstataŭas provizore F-ino. Rosa Cortés. S-ro. A. Graells estis elektita de la Komitato por okupi la lokon vakantan pro eksiĝo de la ofico de voĉdonantino, kiun prezentis F-ino. L. Sánchez.

JOZEFO GRAU

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

La Komisiono por tiu projekto invitis la dekkvar efektive ekzistantajn grupojn en Barcelono al kunveno, kiu okazis en la sidejo de «B. S.» la 14an de Aŭgusto. Ĉeestis reprezentantoj de naŭ grupoj, nome : S-roj. Renom, de *Ĉiam Antaŭen;* Tomás, de *Esperanta Racionala Grupo;* Agud, de *Esperanta Frateco;* Pellicer, de *Barcelona Stelo;* Piñol, de *Supren!;* Muria, de *La Rondo;* Gili, de *Esperanta Fako del Centre A. de D. del C.;* Mateu, de *Esperanto kaj Patrujo* kaj Llorach, de *Espero Kataluna. Paco kaj Amo* sendis komunikon, promesante studi la laboron de la Komisiono.

Prezidis la kunsidon laŭ elekto de la ĉeestantoj, S-ro. Rey. La projekto publikigita en nia lasta BULTENO estis akceptita principe de ĉiuj reprezentantoj, krom de tiu de *Espero Kataluna*. S-roj. Piñol, Renom kaj Pellicer, nome de la grupoj, kiuj ilin delegis, plene akceptis la projekton. S-ro. Gili aliĝis ankaŭ al tiu akcepto, kun rimarkoj pri tio ke la grupo de li reprezentata estas fako de neesperantista asocio.

Ĉar kelkaj el la reprezentantoj ne havis plenan rajton decidi pri la afero, kaj ankaŭ ĉar kelkaj Komitatoj ne povis tute esplori la projekton, oni decidis kunvoki por la 6a de Septembro novan kunsidon en la sama loko, petante la grupojn pri sendo de rajtigita delegito. La Komisiono esprimis sian deziron, kaj la kunsidantoj ĝin aprobis, ke la grupoj estu reprezentataj, en la venonta kunsido, de la tuta Komitato; tiamaniere oni pli efike povos labori.

Kelkajn ŝanĝojn oni proponis, kiuj pliperfektigas la prezentitan Regularon. Ili rilatas flankajn detalojn, kiujn tre bone zorgis la reprezentantoj de *Esperanta Racionala Grupo,* pretaj akcepti la Regularon, kiam la modifoj prezentitaj estos aprobitaj.

Resume : ni povas diri, ke certeco pri la sukceso de la entrepreno venis en la koron de ĉiuj ĉeestantoj. Ni esperas, ke post la venonta kunsido ni povos anonci, ke la *Barcelona Esperantista Societo* estas jam starigita.

MALGRAŬ

Bulteno de

# BARCELONA STELO (Filio de B. E. S.)

Jaro II.-Sup. de «Kataluna Esperantisto».-Sept.-Okt. 1913.-Nro 7 (13)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : JOZEFO GRAU

Barcelono vivu, kresku kaj floru. — L. L. Zamenhof

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Jozefo Grau. — *La Barcelona Esperantista Societo*, Malgraŭ.

## GRUPAJ AFEROJ

*Paroladoj*. La 18an de Septembro nia kara amiko S-ro Joan Campdelacreu paroladis antaŭ la ĉeestantoj de nia kurso praktika pri la temo «Iom pri arto». Fininte, li ricevis aplaŭdojn al lia disertacio farita en flua Esperanto.

S-ro Artur Domènec, samgrupano nia, faros la 13an de Novembro je la 9a vespere en nia sidejo paroladon «Provo de disertacio pri geografiaj aferoj».

Ĉiuj esperantistoj estas invititaj.

*Vizito*. Fraŭlino Anĝelino Sicart grupanino de *Lumon* (Terrassa) okaze traveturante Barcelonon volis fari al ni la honoron de sia vizito la 25an de Septembro. La tuta grupanaro kaj ĉefe ŝiaj kunulinoj en la Kortego de la Floraj Ludoj de Terrassa, F-inoj Rey kaj Puig akceptis ŝin plej kore kaj klopodis agrabligi al ŝi la restadon inter ni, kiun oni trovis mallonga. Al la simpatia amikino nian dankon por la afableco nin viziti.

*Decido*. En sia septembra kunsido la Direkta Komitato decidis konsideri kiel honorajn membrojn de la grupo niajn forveturintajn kungrupanojn dum la tempo de ilia foresto, S-rojn Delfí Dalmau kaj Joan Gili. Ilin adiaŭis oficiale nome de la grupo S-ro Rey, nia prezidanto, dum la festeno dediĉita de la barcelonaj samideanoj al S-ro Dalmau, kiu de Málaga sendis al ni salutan karton sciigante nin, ke li kunveturas kun S-ro Vila, samideano el Sta. Coloma de Farnés, kiu helpos lin organizi dumvojaĝe en la ŝipo paroladon pri Esperanto.

la akton de la pasinta kunveno, notis pri la delegitoj rajtigitaj de la grupoj kaj decidis kunsidi denove la 14$^{an}$ de Oktobro en la sidejo de *Semo*. Tiun tagon plenumante la regularon aprobitan stariĝis la Komitato de B. E. S., kiun formas sinjoroj : Lleonart Renóm, del. kaj Ramón Soler, subdel. de *Ĉiam Antaŭen*; Lluis Tomás, del. kaj Frederic Diaz, subdel. de *Esperanta Racionala Grupo*; Esteve Rey, del. kaj Josep Grau, subdel. de *Barcelona Stelo*; Joan Campdelacreu, del. kaj Jaume Muria, subdel. de *La Rondo*; Francisco Piñol, del. kaj Eussebi Durán, subdel. de *Supren*; Joan Leonor, del. de *Semo* kaj F. Agut, del. de *Esperanta Frateco*.

Ĝi redaktis la internan regularon de la Komitato, kaj decidis : 1$^e$, prezenti la Regularon al la leĝa aprobo de la Provincestro; 2$^e$, kalkuli la provan periodon depost la 15$^a$ de Oktobro; 3$^e$, kunsidi la unuan mardon de ĉiu monato kaj 4$^e$ elekti por la ofico de Kasisto S-ron Joan Leonor, kaj por tiu de Sekretario S-ron Lleonart Renom.

Fine, oni parolis pri la sinteno rilate B. E. S.'on de la grupoj ankoraŭ ne aliĝintaj, kiun sinteze ni prezentas jene:

*Paco kaj Amo* kaj *Espero Kataluna* ne decidis ankoraŭ pri sia aliĝo : ili laŭ certigas iliaj leteroj studos la projekton. *Esperanta Aŭroro* kaj *Esperanto kaj Patrujo* manifestis al la Komitato, ke ili ne aliĝas. *Libera Stelo*, kiu travivis epokon malfacilan, ne montris ankoraŭ sian opinion. La du novajn grupojn, kreitajn post la 6$^a$ de Septembro, nome *Fajro* kaj *Esperanta Stelo* oni invitos al la B. E. S., kaj pri iliaj respondoj ni raportos pli poste.

Ni multe fidas al la laboro, kiun faros la Komitato de B. E. S., en kiu partoprenas multaj samideanoj, kies agemon oni bone konas.

* * *

## KONKURSO DE LEGOARTO

En venonta numero ni parolos pri la festoj en organizo por solenigi la starigon de la *Barcelona Esperantista Societo*. Inter ili la plej grava estos konkurso por legantoj, kiuj povos aspiri al la tri premioj proponitaj kaj al aliaj, kiujn certe la Komitato ricevos. La kondiĉojn de l' konkurso ni publikigos detale.

Amikoj, preparu vin partopreni.

MALGRAŬ

# Bulteno de
# BARCELONA STELO (FILIO DE B. E. S.)

Oficiala Organo de «Barcelona Esperantista Societo»

JARO II. – SUP. DE «KATALUNA ESPERANTISTO». – NOV.-DEC. 1913. – NRO 8 (14)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU


---

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

---


ENHAVO : *Grupaj aferoj.* — *Barcelona Esperantista Societo.*


---

## GRUPAJ AFEROJ

La parolado, kiun faris nia kungrupano S-ro Artur Doménec la 13an de Novembro, tre plaĉis al la ĉeestantoj, kiujn vere mirigis la korekta lingvoformo de la «Disertacio pri geografiaj aferoj», kiun li legis antaŭ la praktikkursanoj de nia societo. Al S-ro Doménec, kiu post sesmonata lernado de nia lingvo tiel multe ĝin konas, ni aŭguras triumfojn en la esperantista kampo.

— Ni ricevis la 6an de Novembro la afablan viziton de germana samideano S-ro Conrad Berghänel, kiu venis Barcelonon antaŭ nemulte. Li kore salutis kaj dankis nin por la akcepto al li farita. Al li nian koran bonvenon.

— La redaktoro de la BULTENO DE «B. S.» proponis ĝin nome de la grupo al la Komitato de la *Barcelona Esperantista Societo*, kiu en sia kunsido de la 4.a de Novembro prenis ĝin, kiel Oficialan Organon. La sciigoj pri la taskoj kaj projektoj de la «B. E. S.» aperos do sur niaj malmultaj paĝoj.

— S-ro Josep Carcereny, nia kunkomitatano, urbkonsilanto barcelona, suferis la malfeliĉan perdon de sia amata patro, S-ro Jaume Carcereny Tristany, kiu mortis la 7an de Novembro.

Nia kara amiko scias, ke lia malĝojo estas ankaŭ nia kaj ke ni kunpartigas kun li lian ĉagrenon. Pace ripozu la mortinto!

— La Komitato de «B. S.» ricevis de la Komitato de la Xa Universala Kongreso de Esperanto proponon organizi paroladon kun lumbildoj, kiun faros S-ro Cl. Colas, por tio komisiita de tiu Komitato.

Post interkonsento kun la grupo «Semo», kiu ankaŭ volis akcepti tiun proponon, ni decidis okazigi ĝin en la salono por festoj de la Enciklopedia Popola Ateneo (str. Carme, 30) en la dato, kiun ni fiksos konsente kun la Pariza Komitato.

La elspezojn pagos poduone «Semo» kaj «Barcelona Stelo».

Jen la programo de la parolado de S-ro Colas:

Senkompara agrableco de Esperanto por vojaĝoj : kiel per Esperanto, mi vojaĝis en 14 landoj, vidis Amerikon kaj vizitis la Indianojn en Kanado (kelkaj vojaĝaj aventuroj). — La ĉefa-ĉiujara manifestacio de la esperantista movado : la *Universala Kongreso*. — Kion oni faras kaj vidas en la Universalaj Kongresoj de Esperanto. — LA DEKA, kia ĝi estos. — PARIZO, la Lumurbo. Diversaj belaĵoj de Parizo, artaĵoj, monumentoj, k. t. p. (60 lumbildoj). — Kiamaniere Parizo akceptos kaj gastigos la Esperantistojn en Aŭgusto de 1914.

Ni esperas, ke ĉiuj barcelonaj samideanoj ĉeestos en la paroladfesto.

★ ★ ★

## BARCELONA ESPERANTISTA SOCIETO

Por komenci siajn taskojn la Komitato de «B. E. S.» petis de S-ro Fred. Pujulá, ke li bonvolu paroladi publike pri sia vojaĝo tra Germanujo kaj sia vizito en Varsovio. Li volonte akceptis la proponon, kaj lia parolado okazos la 13$^{an}$ de venonta Januaro je la 10$^{a}$ vespere en la salono, kiun la «E. P. A.» metis sub nian disponon. Ni raportos pri ĝi.

— Inter diversaj festoj, kiujn «B. E. S.» organizas, okazontaj dum la fino de Marto kaj komenco de Aprilo venontaj, estos konkurso de Legoarto pri kiu ni jam ion diris en lasta BULTENO. Nun ni povas aldoni sciigojn pri la kondiĉoj de tiu Konkurso, kiu certe interesos multajn niajn amikojn. Tri premiojn oni aljuĝos : Unua, 15 pesetoj (6 Sm.); dua, 10 pesetoj (4 Sm.), kaj tria, arta objekto. Partoprenontoj pagos por matrikulo 50 centimojn; ili legos antaŭ la publiko versaĵon kaj prozaĵon en Esperanto (la samaj por ĉiuj konkursantoj), kiujn oni havigos al ili 5 minutojn antaŭ ilia publika legado. Ĉiu konkursanto, leginte la konkursajn verkojn devos legi unu poezion esperantan libere de li elektitan, kiu helpos la Juĝantaron juste aljuĝi la premiojn.

En la Konkurso povos partopreni *ĉiuj* esperantistoj. Detalojn ni ankoraŭ publikigos.